

Eŭropa Bulteno

Junio/Julio 2015, Numero 150

VORTO DE LA REDAKTORO

Karaj legantoj,



Denove ni atingis malgranda jubileon: la 150-an numeron de Eŭropa Bulteno. En la periodo de la 100-a numero en 2010 pasis tre fruktodona periodo de Eŭropa Esperanto-Unio. Ni praktikis tion kion ni celis ekde la komenco de la pli-malpli sama estraro kaj tio estas:

1. Sukcesi gravaparte financi la asocion el Eŭropaj fondaĵoj
2. Baze de tio pli relaisme proksimigi la E-movadon al la eŭropa politiko kaj gajni pozitivan reputacion ĉe eŭropaj instancoj kia la Parlamento kaj oficejoj de EU. Tiucele ni daŭre kreskis ricevinte 5 eŭropajn subvenciojn el kiuj ni realigis

kvar gravajn eŭropajn malfermajn konferencojn kun partopreno de renomaj politikistoj, dokumenton kun multaj referncoj al Esperanto akceptitatan de Eŭropa Platformo por Multlingvismo kaj grandegan lingvan retan paĝaron lingvo.info. Per la Eŭropa Bulteno ni sukcesis realigi ankaŭ resuman raporton pri Esperanto en ĉiuj 27 landoj de EU, kiun ni eble sukcesos ankaŭ aperigi iam libroforme. Paralele ni organizis regule ĉiun duan jaron niajn Eŭropajn Esperanto-kongresojn kiuj ankaŭ regule entenis ĉeftemojn interesajn por la ĉirkaŭa medio kadre de kiu prelegis fakuloj nesperantistaj.

Nia klopodo iom post iom atingi punktojn de kiuj ni povus proponi certan rolon por Esperanto en EU iom post iom prosperas kun pluraj dornoj survoje. En 2008 ni havis ekspozicion de Esperanto en la ejoj de la Eŭropa Parlamento kaj konferencon pri Esperanto same en la ejoj de la Parlamento. Plurfoje nia strategio paroli pri Esperanto kiel katalizilo por lerni pli efike fremdajn lingvojn (ne nur la anglan) atingis pozitivajn reagojn kaj ankaŭ nia iniciato pri eŭropa himno en Esperanto trovis tre pozitivan eĥon ĉe pluraj neesperantistaj korusoj. Tamen burokrataro de EU sukcesis kontraŭstari kelkajn niajn iniciatojn kiel la proponon de Ljudmila Novak trakti Esperanton kadre de Komisiono por Kulturo en EU-parlamento kaj nia propono starti eŭropan popolan iniciaton pri kantado de Eŭropa himno.

Kaj nun ni troviĝas antaŭ nova defio: startante per la konferenco prilingva en Bratislavo kaj pluigante por atingi la agnoskon de Esperanto kiel kultura nacia heredaĵo ankaŭ en kelkaj aliaj landoj krom Pollando atingi ian oficialan postulon de la Viŝegradaj ŝtatoj komenci trakti lingvan kaj kulturen eŭropan politikon far eŭropaj instancoj.

Do, Eŭropa Bulteno plu informados vin pri tio kion EEU faras kaj pri diversaj aliaj eŭropaj temoj.

Zlatko Tišljar

EŬROPA KOMISIONANO TRE VERŜAJNE EN UK 2016

Kiel prezidanto de EEU mi renkontis la Eŭropan Komisionanon pri sano, sinjoron Vytenis Andriukaitis en lia oficejo en la Berlaymont (Bruselo) la 9-an de julio 2015. Li akceptis min tre amike kaj tuj esprimis sian simpatian por Esperanto kaj la ideo de lingva samrajteco. Dum longa tempo li ne parolis Esperanton, sed li volas renovigi sian konatecon kun la lingvo kaj li laŭlegis en Esperanto el pluraj libroj kiujn mi donacis al li.



Plej grave, li akceptis la inviton de EEU paroli dum la konferenco pri Eŭropa lingvopolitiko en Bratislavo, okaze de la 101a UK kaj la komenco de la unua slovaka prezidenteco de EU. Eble tiukaze li vizitos ankaŭ la UK en Nitra. Li petis nin doni la precizan daton al lia sekretariejo kiom eble plej baldaŭ, ĉar li jam havas multajn terminojn en 2016. Li montris grandan intereson en la Viŝegrada iniciato pri lingva politiko kaj faris multajn demandojn dum nia 40-minuta kunveno. Li promesis kontakti sian kolegon, la hungaran Komisionanon Tibor Navracsics por interesigi lin pri nia laboro. Li bone konas la koncepton de "lingva

imperiismo", eĉ el la sovetaĵoj kiam li estis en malliberejo kaj mem menciis tiun ideon plurfoje. Li parolis pri la lingva imperiismo de la rusa en la soveta periodo kaj kiel li ĉiam kontraŭis tion. Mi menciis la librojn de profesoro Robert Phillipson, sed li ne konis ilin. Tamen li jam rigardis la interretan prezenton de Esperanto kaj multlingvismo kiun mi faris en la serio "Lingvaj Ambasadoroj" – li substrekis ke tio tre plaĉis al li.

Mi donacis al li plurojn librojn kaj Esperantaĵojn:

- La dvd-on kiun produktis Flory Witdoeck pri la Eŭropa Himno, kun partoj de la 28 naciaj himnoj de la 28 EU membroŝtatoj. Ankaŭ la vortoj kaj muziko en Esperanto, kaj priskribo de la tuta afero en la litova. Li montris grandan intereson al tio.
- La libron pri la EEU-konferenco de Triesto en 2012 pri "Kia estus Europano se EU neniam ekzistus".
- La libron de proverboj de lingvo.info.
- La libron de Angela Teliere pri "Springboard to Languages", kaj la lernfaciligaj ecoj de Esperanto.
- La libron de la konferenco de EEU en Maribor en 2007 "Interkultura Dialogo kaj Komunikado".

Seán Ó Riain

Rimarko de la redakcio: Ni tre petas eŭropajn esperantistojn ke eventualajn reagojn ili sendu NEPRE NUR al la prezidanto de EEU, ĉar li promesis ke neniu rekte skribos al sinjoro Andriukaitis. Seán, do kolektos, resumos kaj kadre de plua kunveno transdonos! Komisionanoj neniam rekte ricevas korrespondaĵojn, kaj la sekretarioj unue kontrolas, elektas, forĵetas kaj nur poste transdonas al sia ĉefo!

DO NE SKRIBU REKTE AL LI POR NE FINI EN LA RUBUJO!

GRAVA POLITIKA SUBTENO AL MALFERMITAJ ARANĜOJ DE LA 101-A EN NITRA

La Slovaka Esperanto Federacio (SKEF) sisteme ekstermovade agadas, ekde la membriĝo de Slovakio en EU en 2004, do multe pli frue antaŭ ol UEA aprobis sian Strategian Laborplanon dum la UK en Rejkjaviko en 2013, ke la Esperanto movado kaj landaj asocioj ekagu ekstermovade kaj malfermiĝu al la ekstera mondo.

Dank' al tio SKEF mallonge post la decido de la estraro de UEA en julio 2014, ke la 101-a UK okazos en Nitra en julio 2016, sukcesis akiri promeson de Andrej Kiska, prezidento de Slovakio, transpreni aŭspicion de UK de Esperanto, kiu okazos dum la tempo kiam Slovakio prezidos en la Konsilio de EU.

La loka kongresa komitato (LKK) de la 101-a UK klopodas plej efike utiligi la fakton, ke UK okazos la unuan fojon en membro-ŝtato de EU, kiu prezidos en la Konsilio de EU.

Delegacio de SKEF estis akceptita la 10-an de aprilo 2015 en la Ministerio de Eksterlandaj kaj Eŭropaj Aferoj kaj la Ministerio de Edukado, Scienco, Esploro kaj Sporto de Slovakio por informi ministrojn pri preparoj de la 101-a UK kaj akompanaj internaciaj aranĝoj en Nitra, pere de kiuj la UK malfermiĝos al faka publiko kaj estos organizitaj pluraj eventoj

malfermitaj por la ĝenerala publiko. La delegacio proponis al la Ministerioj ambician kadron de kunlaboro en preparado de la UK kaj akompanaj aranĝoj en Nitra.

Post intensa lobiado Miroslav Lajčák, vic-ĉefministro kaj ministro de Eksterlandaj kaj Eŭropaj Aferoj de Slovakio aprobis jenajn decidojn:

1. Li transprenis aŭspiciojn super „La lingvo-politika konferenco de landoj V4+ (CZ, HU, PL, SK plus aliaj samopiniantaj EU landoj) pri lingva politiko en EU“ kaj "La internacia entreprenista kaj komerca forumo“ por subteni diskuton pri lingvaj kaj kulturaj problemoj en EU kaj kontribui al ekonomia dimensio de diplomatio de Slovakio.
2. "La lingvo-politika konferenco de landoj V4 +" estos listigita en la listo de eventoj de la SK PRES en Konsilio de EU kaj oni informos pri ĝi kadre de la publikmedia prezentado de la SK PRES slovak informagentejo.
3. Li taskigis Jozef Reinvart esti kontaktpersono de la Ministerio de Eksterlandaj kaj Eŭropaj Aferoj de SR kun la LKK de la 101-a UK de Esperanto en Nitra.

Tiu ĉi ŝtata subteno kreas por ni gravan politikan spacon por kunlaboro, akiro de financa subteno pere de projektoj kaj prezentado de tiuj ĉi profesiaj aranĝoj kadre de la SK PRES en Slovakio, V4 landoj, EU/Eŭropo kaj la mondo.

La vicĉefministro dum kelkaj tagoj konsideradis ankaŭ nian proponon, ke ĉiuj artikoloj en la ĉefa paĝaro de la SK PRES estu tradukita en Esperanto, apud la slovaka, la angla, la franca kaj la germana, sed bedaŭrinde fine li ne aprobis ĝin.



La ĉefa kialo, pro kio li ne aprobis ĝin estis duboj pri garantiado de tiu ĉi noviga propono de la vidpunkto de kvalito, kontrolo kaj ĝustatempo de tradukoj en Esperanto, ĉar temas pri la oficiala prezento de Slovakio kaj la Ministerio ne havas homojn kaj teknikajn rimedojn por plenumi tiun ĉi taskon.

Tamen ekzistas ŝanco videbligi nian lingvon kaj tradukitajn artikolojn de la SK PRES en Esperanto,

kvankam ĝi ne estus rekte kaj tuj videblaj sur la oficiala paĝaro de la SK PRES.

La vicĉefministro antaŭ pli ol unu jaro aprobis, ke la logotipo slovak.e.u de la multlingva portalo de E@I por instruado de la slovaka kaj informado pri Slovakio estu prezentita en la oficiala paĝaro de la SK PRES.

Se ni volus sukcesi kaj provi konvinki la vicĉefministron, ni devos eviti la menciitajn dubojn pere de testado de niaj komunaj kapabloj (de EEU) traduki artikolojn en Esperanton, ke ni povus garantii al la Ministerio kvalitan, kontrolitan kaj ĝustatempan liveradon de tradukitaj artikoloj.

Ni havas ŝancon prezenti la traduksistemon de WikiTrans de Eckhard Bick, dana esperantisto, eminenta komputila lingvisto, kiu kun siaj kunlaborantoj sukcesis tre kvalite maŝine traduki ĉiujn 4,5 milionojn da artikoloj de Vikipedio el la angla al Esperanto.

Se ni farus sukcesan testadon de la traduksistemo WikiTrans kun postulaj rezultoj, mi provus denove lobii kaj peti pri rekonsidero de la negativa decido de la vicĉefministro pri aperigo de tradukitaj artikoloj en Esperanto en la paĝaro de la SK PRES, aŭ eventuale akiri almenaŭ eblecon havi ĉiujn artikolojn en Esperanto (kaŝite) sur la multlingva portalo slovak.e.u.

Jozef Reinart

Sekretario de la LKK de 101-a UK
por eksterlandaj, diplomataj kaj fakaj rilatoj

MESAĜO DE LA VICPREZIDANTINO DE EŬROPA PARLAMENTO ULRIKE LUNACEK

La aŭstraj esperantistoj petis lurajn aŭstrajn politikistojn mesaĝi per ilia delegitaro ion al la jubilea Esperanto UK en Lillo. Interalie respondis aŭstra parlamentanino en la EP kaj vicprezidantino de la Eŭropa parlamento per jena mesaĝo:



Karaj kongresanoj!

Dankon pro la invito skribi al vi salutmesaĝon. Kiel vicprezidantino de la Eŭropa Parlamento kaj kiel profesie kvalifikita tradukisto mi scias, kiel grava estas la reciproka kompreno pere de komunikado, kaj kiel malfacila tio povas esti.

La lingva plureco ofte estas donaco, kiu konservas la kulturon, sed foje ĝi estas malhelpo por la interkomprenado. Tial estas granda vizio iniciati komunan (mondan) lingvon por transponti la diversecon. Temas pri vivanta ideo, kiun multaj homoj transprenis kaj daŭrigas. Tiel estiĝas espero kaj kuraĝo, ke konfliktoj estos iam solvataj nur pace.

Mi deziras al vi en tiu senco multe da sukceso dum via monda kongreso, por ke estu malpliigata la danĝero de fremdiĝo de homoj pro la diverseco de la lingvoj pere de naciismo, militismo kaj milito.”

magistrino Ulrike Lunacek,
vicprezidentino de la Eŭropa Parlamento

LIBRO DE MADRIDA PROFESORO PRI ESPERANTO

Oni ĵus eldonis libron pri Esperanto en la angla lingvo ĉe la eldonejo de la universitato de Pensilvanio. Ĝia titolo estas "Esperanto and Its Rivals, the Struggle for an International Language" (Esperanto kaj ĝiaj rivaloj, la lukto por internacia lingvo). La aŭtoro estas Roberto Garvía, profesoro de Sociologio de la universitato Carlos III de Madrido.



En la libro, Garvía analizas la movadojn por internaciaj lingvoj, fokusigante sian atenton en la malsamaj strategioj sekvitaj de la partianoj de Volapuko, Esperanto kaj Ido. Li esploras la kialojn pro kiuj Esperanto venkis en la batalo kontraŭ la ceteraj konstruitaj lingvoj, sed tamen malvenkis en la milito kontraŭ la angla kiel internacia mondlingvo.

Garvía verkis ĝin ĉefe dum sia estado en Usono kiel profesoro de la katedro "Princo de Asturio", kiun la hispana registaro sponsoras en la universitato Georgetown.

Toño del Barrio

KATALUNA E-KONGRESO 2015

Estas jam la dua aliĝperiodo por la 37a Kataluna Kongreso de Esperanto, okazonta ĉi-jare en Mataró la du lastajn tagojn de oktobro kaj la 1an de novembro. La kongrestemo estos "Ŝancoj de enmigrado" kaj elstaras la partopreno de István Ertl, Jorge Camacho kaj la kongolanda muzikisto Zhou-Mack Mafuila.



La retejo de la kongreso: <http://www.esperanto.cat/kongresoj/2015/>

Farri Macip i Bonet

REAGE AL DEBATO PRI MULTLINGVISMO

En la portalo: <http://www.debatingeurope.eu/2014/12/09/english-official-language-eu/#.VZzukGPJPAk> aperis Debato al kiu nia prezidante reagis jene:



Rakonteto: “Ni havas fieran purrasan kurĉevalon (Esperanto), idealan por internacia komunikado. Tamen, iuj ekstreme riĉaj kaj potencaj homoj produktas azenojn (Angla). Ili estas tiel riĉaj kaj potencaj, ke ili cerbolavis la tutan mondon kaj kredigis, ke iliaj azenoj estas la plej rapidaj kvarpieduloj, kaj ke la kurĉevalo ne ekzistas, kaj eĉ se ĝi ekzistus, ĝi ne kapablas kuri. La azenposedantoj faras grandegajn profitojn vendante azenojn, kaj ili kredigis al multaj homoj en ĉiuj landoj, ke “ĉiu devus

posedi azenon”. Tiu situacio alportas astronomie altajn profitojn al ili, tial por ili gravas kaŝi la veron. Ajna normala persono, kiu objektive ekzamenas la situacion, povas vidi, ke la kurĉevalo ekzistas, estas kvaroble pli rapida ol la azeno, kaj fakte kostas multe malpli ol la multekosta azeno. Sed la propagando de la azenposedantoj iĝis ekde 1945 tiel potenca kaj ĉien penetranta, ke homoj ne volas aŭdi la vorton “kurĉevalo” – ili ĉiuj ŝparas por posedi sian propran azenon! Multaj jam investis en azenojn, kaj ili timas, ke la kurĉevalo iam estos serioze konsiderata ... En Esperanto ekzistas bela proverbo, kiu malfacile tradukeblas: “Se la homaro subite malstultiĝus!” – “Se la homaro subite iĝus malpli stulta / perdus sian stultecon”.

Seán Ó Riain

KUNSIDO DE LA ASEMBLEO DE EEU EN LILLO

La JARA ĈEFKUNSIDO DE LA ASEMBLEO DE EEU (nur por assembleanoj kaj anstataŭantoj) okazos en franca urbo Lillo kadre de la Universala Kongreso de UEA kaj en la kongresejo, ĵaŭdon, la 30-an de julio 2015 je la 13,30 (ĝis 15,00).

Tagordo de la kunsido:

1. Salutparolo de la prezidanto kaj konstato pri la plenrajteco kunsidi
2. Sekretaria raporto pri la agado en 2014
3. Financa raporto de la vicprezidantino kun prezento de balanco por 2014
4. Diskuto pri la raportoj kaj akcepto
5. Propono de la laborplano por 2015 kaj akcepto
6. Decido pri kotizoj al EEU
7. Diversaĵoj

EEU havos ankaŭ publikan kunvenon por ĉiuj interesitoj vendredon, la 31-an de julio inter 12,00 kaj 13,30 kie ni mallonge raportos pri la asemblea kunsido. Poste okazos diskuto pri strategio kaj planoj por la estonto.

Zlatko Tišljár

Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Finredaktita: la 12-an de julio 2015

Redaktoro: Zlatko Tišljár

En la numero kunlaboris: Jozef Reinvert, Zlatko Tišljár, Seán Ó Riain, Anonio del Barrio, Farri Macip i Bonet, Ulrike Lunacek

Kontakto: ztisljar@gmail.com

Retpaĝo: <http://www.europo.eu/eo/euhropa-bulteno>

